# Trejnilo de Esperanta Leksiko

Kompilo kaj metodika prilaboro: Ryszard Rokicki

## TESTO 2

**Ekzerco 1.** Enskribu ĝuste en la vortspacon.

1. Virina ␣ ␣ d ␣ ␣ ␣ pli kaptas ol reto.
2. Post domaĝo ␣ ␣ n ␣ ␣ saĝo.
3. Ŝparu kiam ␣ ␣ n ␣, vi havos kiam bezone.
4. Eĉ el sub la ␣ ␣ r ␣ aperas la vero.
5. Kiu pli frue venas, pli bonan ␣ ␣ k ␣ ␣ prenas.
6. La diferenco de la lingvoj prezentas la esencon de la diferenco kaj reciproka malamikeco de la ␣ ␣ c ␣ ␣ j.
7. En la kota vetero mia vesto ␣ ␣ r ␣ e malpuriĝis, tial mi prenis broson kaj purigis ĝin.
8. Tiu ĉi libro havas sesdek paĝojn; tial, se mi legos en ĉiu tago po dek kvin paĝoj, mi ␣ ␣ n ␣ ␣ la tutan libaron en kvar tagoj.
9. La surtuto estas aĉetita de mi, ␣ ␣ k ␣ ␣ ĝi apartenas al mi.
10. Kiam en lia kapo ␣ l ␣ n ␣ formiĝis la plano de lia entrepreno, li estis vigla, plena de fortoj kvardek-ok-jara viro.

**Ekzerco 2**. Finskribu ĝuste en la vorton.

1. Multaj birdoj flugas en la aŭtuno en pli varmajn l ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ ␣.
2. Kun maldolĉo en la k ␣ ␣ ␣ li forlasas Genuon por nova migrado kaj novaj provoj.
3. Nia lando venkos, ĉar nia m ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ t ␣ ␣ ␣ estas granda kaj brava.
4. “Jes, patrino”, r ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ d ␣ ␣ al ŝi la malĝentilulino, elĵetante unu serpenton kaj unu ranon.
5. M ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ al ili vian novan veston.
6. La fotografisto fotografis min, kaj mi s ␣ ␣ d ␣ ␣ mian fotografaĵon al mia patro.
7. Post infekta malsano oni o ␣ ␣ ␣ bruligas la vestojn de la malsanulo.
8. La malfeliĉa infano forkuris kaj kaŝis sin en la plej p ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ arbaro.
9. La filo de la reĝo d ␣ ␣ ␣ ␣ d ␣ ␣ ŝin, kion ŝi faras tie ĉi tute sola kaj pro kio ŝi ploras.
10. Neĝulino pli volonte restis hejme kun la patrino, h ␣ ␣ p ␣ ␣ ŝin en la mastrumaj laboroj, aŭ voĉe legis, kiam la laboro estis finita.

**Ekzerco 3.** Kreu el la radikoj ĝustan vorton kaj enskribu ĝin.

| mult’, don’, riĉ’, ali’, alt’, hom’, feliĉ’, vir’, long’, am’ |
|---|

1. Rakontu al mi vian ␣ ␣ l ␣ ␣ ␣ ␣ ĉ ␣ ␣, ĉar eble mi povos helpi al vi.
2. Inter la danĝeraj infektoj, la plej grandan damaĝon al la ␣ ␣ m ␣ r ␣ kaŭzis variolo.

3. ␣ ␣ r ␣ ␣ ␣, kiu kuracas, estas kuracistino; edzino de kuracisto estas kuracistedzino.

4. La ␣ ␣ ␣ g ␣ c ␣ de la konkursaĵoj ne estas fiksita – la ĵurio aprezas la fabelecon kaj originalecon de la verkaĵo.

5. La registaro d ␣ ␣ ␣ ␣ n ␣ ␣ monon por subteni novajn programojn; ĉi-jare mankis mono, tamen planataj estas iniciatoj rilate al kampara evoluigo.

6. Temistoklo edzinigis sian filinon je homo tre bona, sed ␣ ␣ l ␣ ␣ ĉ ␣ ĉar, li diris, "mia filino pli volas homon sen havaĵo, ol havaĵon sen homo".

7. Kaj oni ne nur umis kaj pli konkrete ␣ m ␣ ␣ d ␣ m ␣ ␣ (neeviteblega afero en la junulara medio), sed ankaŭ ne malofte lernis.

8. Germandevenaj kazaĥoj tute ne konantaj la germanan ␣ ␣ l ␣ ␣ g ␣ pli facile ricevas germanan civitanecon ol turkidoj naskitaj en Germanio.

9. Evidentas, ke la homa transviv-instinkto pretas oferi ␣ l ␣ ␣ l ␣ ␣ ␣ por savi la propran haŭton.

10. Tiu ĉi granda ␣ l ␣ ␣ ĵ ␣ ne estas natura monto.

**Ekzerco 4.** Marku vorton korespondan plej ĝuste:

1. Magazeno, en kiu oni vendas cigarojn, aŭ ___, en kiu oni tenas cigarojn, estas cigarejo.
   a. sinjoro b. formo c. ĉambro d. mano
2. Ni ĉiuj kunvenis por priparoli tre ___ aferon, sed ni ne povis atingi ian rezultaton kaj ni disiris.
   a. kelkan b. lastan c. gravan d. plenan
3. Donu al la birdoj akvon, ĉar ili ___ trinki.
   a. kredas b. laboras c. legas d. volas
4. Vi skribas, kaj la infanoj skribas, ili ĉiuj ___ silente kaj skribas.
   a. sidas b. finas c. iras d. deziras
5. Li ___ rozokoloran superveston kaj teleroforman ĉapelon.
   a. portas b. helpas c. demandas d. kredas
6. ___ homoj sentas sin la plej feliĉaj, kiam ili vidas la suferojn de siaj najbaroj.
   a. Tutaj b. Plenaj c. Kelkaj d. Samaj
7. Li tuj faris, kion mi volis, kaj mi dankis lin por la tuja plenumo de mia ___.
   a. tero b. deziro c. vojo d. mondo
8. Grandega hundo ___ sur min sian antaŭan piedegon kaj mi de teruro ne sciis, kion fari.
   a. iris b. heplis c. metis d. ĝojis
9. Mi sidas sur seĝo kaj ___ la piedojn sur benketo.
   a. komprenas b. tenas c. konas d. finas
10. Ni faris la kontrakton ne ___, sed parole.
   a. skribe b. milite c. move d. okaze

ibe b. milite c. move d. okaze